



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Gvidilo por la membro-administrado

La mastrolisto

La kerno de la membro-administrado estas la majstro-listo, kiu entenas ĉiun necesan informon, inkluzive de la membro-historio tra la jaroj. Praktike, tio estas Excel tabelo, el kiu kapablas kompili plej diversajn raportojn, ĉu en formato Excel, ĉu Word. La mastroliston manipulas normale nur la membro-administranto, kiu povas esti la sekretario aŭ alia nomumito. La plena mastrolisto estas laŭofice enrigardebla nur de la membro-administranto, la kasisto, la prezidanto kaj la sekretario (se tiu ne mem administras la membrojn). Aliaj estraranoj rajtas peti al la prezidanto se ili bezonas enrigardi iun parton de la plena listo por plenumi siajn taskojn.

La konciza membro-statistiko

Tiu estas derivita en la fino de ĉiu monato de la mastrolisto. Ĝi prezentas sur unu paĝo superrigardon pri la membro-evoluo. Ĝi listigas la landojn alfabete, indikante por ĉiu la nombron de ‘paperaj’ membroj, ‘retaj’ membroj, kaj la sumo, eventuale kun la finsumoj por la antaŭa jaro. Ĉi tio estas plene publika dokumento, ĝi videblu en nia retejo kun ĉiumonata aktualigo. Por nun la afiŝiga formato estu PDF. Neniu membro-nomo enestas, nur nombroj kaj eventuale komentoj. Vidu anekse modelon.

La pli ampleksa membro-statistiko

Tiu estas derivita en la fino de ĉiu jarkvarono. Ĝi prezentas la samon kiel la konciza listo, sed aldone indikas aparte la dumvivajn, honorajn kaj koleghelpajn membro-nombrojn. Tiu dokumento estas por la estraranoj kaj sekciestroj kaj, laŭ estrara konsento, por aliaj helpantoj por kiuj la informoj necesas. La kompilo en la 30a de junio eniras la jaran raporton, kun sumoj por la kuranta kaj pasinta jaroj – por ke la komitato tion akceptu dum la konferenco.

Senadresa mastrolisto

Tiu estas derivita de la mastrolisto en la fino de ĉiu jarkvarono. Plej gravas la kompilo de la 31a de marto, kiu estas la limdato por membro-anoncado. Ĝi ne prezentas la strat- aŭ poŝt-adresojn; ĝi montras retadresojn nur se la koncernato permesis tion. Ĝi listigas nur la familian nomon kaj urbon de la membroj. Ĝi laŭeble enhavas nur la plej bezonatajn informojn (ekz. nur datumojn por la kuranta jaro). La tutmonda listo estas je dispono de estraranoj; land-specifaj versioj iras al la sekciestroj, por ke ili povu rekontroli, ke ĉio estas orde listigita kaj rapide reklamaci kaze de mankoj. La sekretario kontrolas la korektan registron de la Koleghelpkasaj membroj, kiuj devas esti antaŭ la 31 de marto deciditaj kaj traktitaj. (vidu apartan gvidilon pri tio).

Rilato inter membro-administranto kaj kasisto

Tio devas esti intensa kaj kontinua, laueble per afiŝigo de dokumentoj en sekuraj retejoj, prefere al uzo de retmesaĝoj. Se retmesaĝe, estu mekanismo konfirmi la ricevon. Necesas harmoniigi la membro-registrojn kun alvenoj de pagoj, kaj iel prinoti tion, aŭ en la mastrolisto, aŭ en vikio, aŭ en kopio de la laŭlanda membrulisto. En kazo de mankanta aŭ malĝusta pago, la kasisto atentigas la sekciestron aŭ petas pliajn klarigojn. En kazo de malklaraĵoj en la deklarita

membraro, la problemo estu raportita unuavice al la sekretario, kiu petas klarigojn de la koncerna sekciestro. La estrarano pri Landa Agado povas ekagi tiukaze, kunlabore kun la sekretario. Nesolvitaj problemoj ne rajtas kuŝi sen diskonigo kaj pritrakto. La kasisto devas komuniki regule al la membro-administranto informojn pri alvenintaj pagoj, ĉar foje venas pagoj sen nomlistoj; necesas akiri tiujn. La membro-administranto kaj la kasisto interŝanĝu informojn almenaŭ dusemajne tra la periodo januaro-junio.

Se problemo persiste restas nesolvita, la prezidanto laŭpete povas interveni. Tio okazus ekzemple se iu lando plene silentas, aŭ se la membronombro tutmonde aŭ en grava lando signife falas. La sekreto al sukcesa membro-administrado (sekve por la financa kaj reputacio bonfarto de la tuta ILEI) estas regula prizorgo kaj diskonigo de rezultoj, por ke rapida interveno eblas en la kazo de malbonaj evoluoj.

Rilato inter la mastrolisto kaj la dissendo de IPR

La plej aktuala stato de la mastrolisto estas la fonto por la adresaro (nomo + retadreso) storata ĉe ILEI-mondo, por la aŭtomata dissendo de mesaĝoj kun la alirvojo al numeroj de IPR, kiuj iras al la ret-membroj, tiuj paperaj membroj, kiuj petis aliron al la reta versio, al ĉiu sekciestro kaj estrarano. Ĝi same estas la fonto por la anoncado de ĉiuj ŝanĝoj kaj aldonoj al FEL por la ĝisdatigo de la membrolisto en la komputiloj de FEL. Ambaŭ dissendolistoj devas esti aktualigitaj tuj antaŭ la apero de ĉiu numero de IPR. Ĉar FEL devas enpreni modifojn, gravas, ke la mastrolisto de ILEI kaj la listo uzata en FEL estu kiel eble plej harmoniigitaj, kaj nia listo devas havi manieron noti ĉiujn ŝanĝojn kaj aldonojn inter du numeroj de IPR.

Verkis: SMG, ICE91, Gottingen-Linz, 3an de januaro, 2012.
Revizitis, Herzberg, 24an de majo, 2012.

Aneksa: Modelo de komenca parto de konciza laŭlanda statistiko:

(S) = Lando kun sekcio komence de 2011.

(S*) = Sekcio revivigenda

(R) = Lando kun reprezentanto komence de 2011

(/) = Lando kun nek, nek. Varbota.

(s) = Lando kun planoj fondi sekcion

(K) = Koleghepkasa helpo

Lando	M2009 sume (p)	M2010 sume (p)	Lando	M2009 sume (p)	M2010 sume (p)
Albanio (S)	6	6 (0)	Luksemburgo	0	1 (1)
Argentino (/)	1	2 (2)	Meksiko (/)	2	6 (6)
Armenio (R-s-K)	0	5 (5)	Nederlando (S)	21 (15)	22 (19)
Aŭstrio (/)	1	0 (0)	Nepalo (/K)	1	1 (1)
Aŭstralio (S)	6	9 (3)	Nikaragvo (/)	0	1 (1)
Barato/Hinda Unio (R)	1	2 (2)	Norvegio (S)	8	6 (6)
Belgio (S)	10	11 (9)	Nov-Zelando (R)	0	1 (0)
Benino (S-K)	5	5 (5)	Nov-Kaledonio (/)	0	1 (0)
Brazilo (S) +	81 (39)	49 (35)	Pollando (S)	20	27 (9)
Bolivio (/)	0	1 (1)	Rumanio (S)	18	18 (1)
Britio (S*)	5	3 (3)	Rusio (S*)	1	2 (2)
Bulgario (R-s)	0	0 (0)	Serbio (R-s)	6	11 (11)
Burundio (S-K)	4	7 (7)	Salvadoro (/)	1	1 (0)
Ĉeĥio (S)	4	5 (5)	Slovakio (/)	0	3 (0)
Ĉilio (R)	0	1 (1)	Slovenio (/)	1	1 (1)

La vicigo en du kolumnoj ne estas deviga. Kiam tio estas publike afiŝita, ĝi bezonas klarigojn, kiel en la plena modelo, uzita por la jarraporto pri 2010 prezentita en Kopenhago. Vidu la dokumenton: Modelo por Konciza Laŭlanda Statistiko.pdf.

Intertempe ekzistas tia statistiko pri 2011, kaj ege gravas kiel eble plej baldaŭ havi la samon por 2012, por ke la sekciestroj kontrolu tion.